

La 24-a IFEF-Kongreso en Lugano
Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI 451, 1972.05.31 & 06.03

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

Dum la pasinta semajno ni aŭdigis intervjuojn, kiujn ni registris en Lugano okaze de la 24-a Kongreso de Internacia Fervojista Esperanto-Federacio.

A.- Hodiaŭ ni raportos pri tiu bela kongreso, kiu disvolviĝis de la 6-a ĝis la 12-a de majo.

Cl.- Entute ĝi grupigis 660 personojn el 18 landoj. Inter ili troviĝis 550 fervojistoj. Do, vere temis pri faka kongreso.

A.- La tuta kongreso disvolviĝis en la sama domo « Padiglione Conza », kiu situas preskaŭ en la centro de la urbo Lugano. Tiu domo montriĝis ideala kongresejo. Ĝia salonego taŭgis por la ĝeneralaj okazaĵoj, kaj aldonaj ĉambroj gastigis la libro-vendejon, la poŝtoficeton kaj la sekretariojn. Je kelkaj minutoj de la kongresejo svarmis la restoracioj, hoteloj kaj magazenoj. Tute proksime buntis belega lagborda parko kun rododendroj kaj aliaj printempaj floroj.

Cl.- Kvankam Lugano estas turisma centro, kiu facile kapablas samtempe gastigi plurajn kongresojn, la IFEF-kongreso ne disvolviĝis en etoso de indiferenteco. Afiŝoj interalie ĉe la enirpordoj de la restoracioj kaj magazenoj avertis pri ĝi. Kaj ĝin aŭspiciis la prezidanto de la ĝenerala direkto de Svisaj Federaciaj Fervojoj, doktoro O. Wichser ; la prezidanto de la Registaro de la kantono Tiĉino, doktoro A. Righetti ; la prezidanto de la Svisa Fervojista Sindikato, sinjoro W. Meier ; la estro de la urbo Lugano, advokato F. Pelli. Tiu lasta invitis delegacion de 100 kongresanoj en la urbodomo.

A.- La Inaŭgura Kunveno komenciĝis per emociiga kaj solena honorigo al sinjoro Giovanni Sasselli, emerita lokomotivestro kaj ano de la Loka Organiza Komitato, kiu mortis unu semajnon antaŭ la malfermo de la kongreso. Dum la Fervojista Muzikistaro de Bellinzona ludis adiaŭan muzikaĵon, la tuta kongresanaro mediteme staradis rigardante al granda florkrono, kie oni povis legi la du vortojn : « *Lasta saluto* ».

Cl.- Notinde estas, ke dum tiu Malferma Kunsido ĉiuj salutantoj uzis nur esperanton, eĉ tiuj, kiuj reprezentis la aŭspiciajn instancojn.

Cl.- La IFEF-prezidanto, sinjoro Joachim Giessner, kies voĉon vi aŭdis okaze de intervjuo, en sia malferma parolado raportis pri la nuna situacio de esperanto. Se oni malpli priidas ĝin, oni ankoraŭ ne trovas la ideon mem de planlingvo kiel memkompreneblan, kaj multaj estas tiuj, kiuj kontraŭbatalas esperanton. La nuna plej bona luktorimedo estas plenkonscie kontraŭbatali niajn kontraŭlojn, ne forgesante, ke « *kontraŭ stulteco eĉ dioj vane luktas* ». Kontraŭbatali ne signifas bati per pugno sur tablon, sed prudente informi kaj laŭeble konvinki.

A.- La saman tagon komuna tagmanĝo permesis al la kongresanoj interkonatiĝi pli facile ol dum la sabata Interkona Vesperto, kiun fuŝis multe tro brua muzikado. Perŝipa ekskurso malkovrigis al la kongresanoj la variecon de la lago Lugano. Fervojistaj muzikistoj beligis tiun ekskurseton per siaj arioj.

Cl.- La vespero de la sama dimanĉo estis dediĉita al koncerto, kiu estis unu el la ĝuindaj momentoj de tiu kongreso. La Fervojista Muzikistaro de Bellinzona inter la muzikaĵoj interpretis marŝon kaj kvodlibeton, kiujn mem verkis ĝia talenta gvidanto A. Sali.

A.- Inter la kulturaĵoj ni menciis la belegan Teatran Vesperon. Tiam ni povis ĝui pri la talento de la bulgaraj geaktoroj Belka Beleva, Anani Anev kaj Mihaial Cabanov. Kvankam la salonego de la kongresejo akustike ne bone konvenis por rekta alparolado al la publiko sen uzo de laŭtparolilo, la kompreno de la bulgaraj aktoroj estis tute kontentiga. La elekto de tri unuaktaj komedietoj stile kaj epoke tre malsimilaj estis tre bona ideo kaj pruvis la ludvariecon de la geaktoroj. Tiu decido venigi talentajn geaktorojn eĉ el tiel fora lando kiel Bulgario por Teatra Vespero estas precedento imitenda.

Cl.- Alia bela momento estis la folkloro vespero. Elstaris la kontribuadoj el la tiĉina (itallingva) parto de Svislando, kun melodioj kelkfoje malĝojaj kaj kelkfoje ritmoŝprucaj, kun dancoj kaj kostumoj popolaj. Tamen ne mankis kontribuadoj el aliaj partoj de Svislando : dum sonoris la profunda kaj impona blovo de alpa korno, alemana flago-svingisto demonstris sian neordinaran sportkapablon.

A.- Sed en tiu 24-a IFEF-Kongreso oni ne nur ĉeestis turismajn ekskursojn kaj artajn vesperojn. La fakaj kunsidoj estis bone frekventataj. Ĉefe mencienda estas la laboro de la Terminara Komisiono, kiun prezidis sinjoro Ritterspach. La nuna klopodo de tiu komisiono estas multigi la nacilingvajn tradukojn de la Fervojista Terminareto. Kun la ĵusa eldono en la nederlanda lingvo, jam aperis tiu vortareto de 2000 vortoj en 5 lingvoj. La gvidanto de tiu komisiono disdonis kompilaĵon de ĉiuj terminoj el la *Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto*. Tiuj terminoj koncernas la fervojan fakon. Gravaj mankoj en *Plena Ilustrita Vortaro* evidentiĝis kaj postulos kunlaboron kun la Terminologia Centro de Internacia Scienca Asocio Esperantista, kies gvidanto nun estas inĝeniero Broise en Francio.

Cl.- Koncerne al la Plenkunsido de IFEF ni sciigu, ke nova statuto estis unuanime akceptita. Ke la ĝisnunaj funkciuloj estis reelektitaj : Prezidanto : Joachim Giessner, Germanio. Sekretariino : sinjorino Elfriede Kruse, Germanio, Kasisto : Otto Walder, Svislando. Redaktoro : Per I Krogstie, Norvegio. Por anstataŭi la demisiintan vicprezidanton Gvozden Srediĉ, Jugoslavio, estis prezentitaj du kandidatoj : Wim van Leeuwen, Nederlando kaj Doktoro Imre Ferenczy, Hungario. El ili la unua estis elektita.

A.- Kiel kongresloko por la venonta jaro estis elektita Aarhus en Danlando. Plej verŝajne en 1974 la IFEF-Kongreso okazos en Hispanio.

Cl.- Ni tre konsilas al vi tiujn kongresojn de la fervojistoj, ĉar ili estas bone organizataj kaj kulture riĉenhavaj.

A.- Vi aŭdis prelegon el Svislando.

Cl.- Parolis gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo!